[10]) Illyricum sacrum. II. 398.
[11]) Istoria ecclesiastico-profana di Corzola, p. 267—9 (Manuskripto el la 18-a jrc., konservita en la Abateja arkivo en Korčula).
[12]) Viestnik IX (1887), 37—38.
[13]) M. Gjivoje, Otoci kamenara (Resumo en Esperanto). Zagreb, 1954. Sc. Rev. 6, 116.
[14]) Frano Radič en Viestnik XIII (1891) p. 50—52.
[15]) Viestnik 1886, p. 123.
[16]) Technologie und Terminologie der Gewerke und Künste bei Griechen und Römern. Leipzig, 1884.
[17]) Die Baukunst der Griechen. Leipzig, 1910. C. III.
[18]) Nat. hist. XXXVI. 50.
[19]) CILIII kaj Supplementum.
[20]) V. Foretič, Otok Korčula u srednjem vijeku. Zagreb, 1940, p. 22.

409.82 : 413

## NEOFICIALAJ VORTOJ EN NIA LINGVO.

### Kelkaj rimarkigoj kaj korektigoj pri la artikolo de D. R. Broadribb en Scienca Revuo 6 81.

de W. P. ROELOFS.

Mi tre bedaŭras ke sen kiu ajn neceso ĉi tiu artikolo aperis kun tiom da eraroj, kio nun devigas al korektigo. Jen do listo de korektigoj: *hurli* (p. 84) ne signifas „bleki strige" (= ululi), sed „bleki lupe" (vidu PV), kaj do ankaŭ la angla traduko *„to hoot"* ne estas ĝusta. Sur la sama paĝo post *fekund-* la angla termino devas esti *„fertile"*.

Pli gravaj estas la jenaj korektigoj kiuj rilatas al la radikoj sur la paĝoj 86-89. El la radikoj ne markitaj per ° aŭ * la jenaj devas havi steleton: *demis* (en la ĵus aperinta Suplemento al PV troviĝas: *demisi-i*), *galaks, galaksi, gen, goel, ĝip, hidrolog, ihtiolog, ignorant* (*ignor* estas radiko oficiala ĉu *ignorant* ne estas simple derivaĵo?), *jubil, kurtizab* (ĉu eble: *kurtizan*?), *nekrologi, planetoid, stif, suspir, ŝalte,* (ĉu ne: *ŝalt*?), *terminolog, traŭb*. El la radikoj markitaj per °, la jenaj devas esti sen kiu ajn marko: *dilat, direkci, incident*, dum per * devas esti signita la radiko *hidrologi*. — El la per * markitaj radikoj, sen kiu ajn marko devas esti la jenaj: *babus, periferi, radium, rotaci, tenajl*, dum la indicon ° devas havi *kentaŭr*.

Malĝustaloke staras *pajac, palindrom, satelit*. — Sendube kunmetaĵoj estas: *arian, bontempl, deport, franciskan, internul, krisoleg*. Nepre radikoj estas: *beletr, bolŝevik, bolŝevism, faŝism, faŝist, sadism, sadist. Arjo, ariano, samaritano* (devas esti: *samariano!* komp. S-ta Mateo **10** 5; S-ta Luko **9** 52, **10** 33, **17** 16; S-ta Johano **4** (4, 5, 7,) 9, 39, 40, **8** 48) ne estas propraj nomoj.



Pri *impresionalism* kaj *impresionalist* mi rimarkigu ke en Encikl. Vortaro (W ü s t e r) kaj Suplemento al PV ĉi tiuj radikoj troviĝas sen *al. Kialici* evidente estas skriberaro anstataŭ *koalici; hirugi* kredeble anstataŭ *ĥirurgi; tanatologi* eble anstataŭ *taŭtologi*(?). Ĉu eble ankaŭ la ne elparolebla *kuplred* estas eraro?

Grava eraro (pri kiu kulpas kompostejo kaj redakcio) troviĝas sur paĝo 90: Post la linio: „*ĉe la Sanktaj Akvoj* ........" devas sekvi:

eld. Svisa Esp. Societo, 1947-8.

*Ekspedicio Kon-Tiki* de H e y e r d a h l (trad. B r y n i l d s e n), eld.

***

El la vortoj menciitaj en la listo sur paĝoj 86-89 kiel ne troviĝantaj en PV unua eldono, la jenaj troviĝas en la dua eldono de 1934: *altruismo, ampolo, aŭtenta, beata, damni, ekskludi, erupti, eskadrono, eŭgeniko, evento, falto, fatamorgano, fotelo, franciskano, galanta, gracila, ĝentlemano, (giroskopo,* sen supersigno), *ideologio, intuo, kaoso, kaskedo, kiosko, koaguli, kohera, koktelo, koneksa, konfirmacio, koruso, kvalifi, legacio, logo, mahometano, mapo, marseljezo, masakri, metapsikio, miraĝo, nano, navigi, nazalo, nocio, nokaŭti* (Encikl. Vortaro: *knokaŭti*), *onomatopeo, organika, paraŝuto, piĵamo, plejdo, protozoo, rara, razeno, referi, referato, relikvo, sakro, sakri, sanitara, semantiko, siesto, skolto, sledo, slojdo, snobo, specifi, spontana, stadiono, staplo, stoko, stompi, strangoli, stumbli, sublima* kaj *sublimi, ŝminki, telepatio, tiktako, tranco, transcenda, (trubaduro* kaj *trobadoro,* sed ne *trubadoro), unio, vodevilo.*

Ne troviĝas en la unua, nek en la dua eldono de PV, sed jes en la ĵus aperinta Suplemento jenaj: *aerodromo, agresiva, armistico, avanci, bebo, celofano, dekalogo, derviŝo, donjuano, donkihoto, eseo, etoso, fanto, de-fraŭdi, galaksio, garaĝo, geno, gineo, gracila* (nova difino), *handikapo, heĝiro, hektografo, hulo* (kun tute alia senco!), *humida, impresionismo, impresionisto, jubili, kajako, kakia, kamiono, kamufli, kodako, kopro, kultivi, kvartiro, lanĉi, lazo, lispi, majusklo, makulaturo, manekeno, manikuro, mesaĝo, mimeografo, morna, nargileo, nazio, neŭtrono, nikso, nirvano, nilono, nukleo, nupto, obskura, pakto, partizano, pasteŭrizi, penicilino, pikniko, plonĝi, plumpa, pojnovra, primuso, psikozo, pundo, rapsodo, rapsodio, ravino, repliko, sadismo, sadisto, sandviĉo, skeĉo, smokingo, splisi, spuro, sterila, stetoskopo, stratosfero, (sublima), suspiri, ŝejko, tajpi, taŭro, teko, telefoto* (*tele-* prefikso), *televidado, tenaca, timida, tonalo, trado, trako, traŭbo, trejni, triliono, trista, truso, ultra, uzino, vagabondo, viruso, vitamino.*

El la listo de la neoficialaj vortoj de s-ro Broadribb do nun nur tre malmultaj *ne* troviĝas en la jusa eldono de Plena Vortaro.